## ILEI raportas

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2025-07-15 ĝis 2025-10-15.

***Ŝlosilpunktoj: rezultoj de la jara Komitatkunsido; ILEI-Kongresoj 2025-2027; sukcesa instruista trejnado en Burundo; gratulojn al Monika Molnár!; rezultoj de la konkurso "Instruistoj de la Jaro"; novaĵoj "Pri Viroj kaj Knikloj"; universitata agado; kunlaboroj kun UEA, INK, CED, Ĉina Komunikila grupo, irana amaskomunikilo.***

### La Komitato

La 2025.07.21 okazis Komitatkunsido, kie estis aprobitaj gravaj dokumentoj de ILEI: Jarraporto – 2024, Financa raporto-2024 kaj Raporto de la kontrola komisiono, Buĝeto-2025

### ILEI-Kongreso 2025

Jen konciza konkludo de LKK laŭ la raporto de Aranka László: 78 ĉeestantaj partoprenantoj en Beogrado, virtuale povis sekvi 91 aliĝintoj; 1 simpozio; 1 seminario;  14 prelegoj; 2 diskutrondoj; 2 atelieroj (1 lingva + 1 metodika); 2 libroprezentoj; 1 ĉeesta ludado; 2 kursoj: por komencantoj (averaĝe tage 6 komencantoj kaj averaĝe tage 10 partoprenantoj – se ni kalkulas ankaŭ la observantojn, asistantojn, helpantojn dum la kurso); kaj paroliga kurso (10-24, averaĝe 15 kursanoj); 2 DT-ekskursoj: promenekskurso kaj vizito al la Etnografia muzeo; 3 TT-ekskursoj; Lingva festivalo: prezento de 18 lingvoj; Solena malfermo kaj Fermo; Interkona vespero, 3 artaj vesperoj (2 koncertoj + Nacia vespero), kaj la Internacia vespero; Libroservo; Bankedo. La kongresa temo estis "Artefarita Intelekto kaj Lingvoinstruado". La simpozion, kun la temo „Artefarita Intelekto kaj Kulturo", organizis Alessandra Madella kun 7 prelegoj de universitataj profesoroj de Bosnio, Cinio, Hispanio, Italio, Japanio kaj Usono: "Kiel tio funkcias" de Samir Ribić de la Universitato de Sarajevo, "La socia imago de AI" de Wu Jing de Pekina Universitato, "Artefarita Intelekto en Arto kaj kosmoteknikoj de Yuk Hui" de Alessandra Madella de Zaozhuang-a Universitato (kun respondo de David Depew de la Universitato de Iowa), "La ambasado Macartney kaj la historia reprezentado pere de arto generita de AI" de Shanshan Chen de la Universitato de Artoj de Shandong, "La malfacila rilato inter la Homa stulteco kaj la Artefarita Intelekto" de Viko de la Universitato de Sevijo, "Al aktiva en fervorula arto pri pop-kulturo" de Du Xin de Universitato Keio, "Inter la inter: Generipova Al kaj traduk-praktiko" de Russell Valentino de Indiana Universitato. La prelegoj spekteblas en ludlisto en la jutuba kanalo „Esperanto + Edukado ILEI".

### ILEI-Kongreso 2026

La Estraro estas klopodanta organizi la kongreson ĉe Zaozhuang-a Universitato en Ĉinio.

**ILEI-Kongreso 2027**

La Estraro havas du rezervitajn proponojn por 2027 kaj faris novan alvokon por tiu jaro.

**Kapabligo**

**Porafrika agado**

**Instruista trejnado en Burundo**

Sukcese okazis en aŭgusto trejnseminario por instruistoj de ŝtataj lernejoj de Burundo. Jen estas detalaj raportoj kun filmeto (en la franca), senditaj de la respondecula estrarano Patrick Manirakiza:

Raporto de la trejnado : https://drive.google.com/file/d/1_qfLG4D4KbcGNykrujAkcHrUE8zjwJ7k/view?usp=sharing

Dosiero kun fotoj: https://drive.google.com/drive/folders/1I0YADCw0BCyCoXlEILWaahoPf84VY0Iz?usp=drive_link

Filmeto : https://drive.google.com/file/d/16iUIsMTaqz6efajWv98Zqla5Tdwz7hp_/view?usp=drive_link

**Sekcioj**

***La Estraro de ILEI varme gratulas nian koleginon Monika Molnár pro la aljuĝita Premio Onisaburo Deguĉi. Vere plene merita premio! Pliajn sukcesojn, kara Monika!***

**Projektoj**

**"Instruistoj de la Jaro"**

Paweł Fischer-Kotowski kaj Fransoazo Noireau iĝis la unuaj laŭreatoj de la konkurso La Instruistoj de la Jaro, organizita de ILEI kun subteno de TEJO. La gajnintoj estis anoncitaj en la 58-a kongreso de ILEI fine de julio en Beogrado.

**Rondiranta rakonto "Pri Viroj kaj Unikloj "**

Bone progresas tiu ĉi projekto. En aŭgusto-septembro unuafoje verkis kaj reverkis samideaninoj el Germanio, Rusio, Italio kaj Japanio.

**Universitata agado**

**Kunpens(ig)adoj pri Esperanto en Universitatoj**

2025.10.06 okazis la 64-a sesio kun jenaj prelegantoj:

Ahmad Reza Mamduhi: "Kurso pri Interlingvistiko por Universitato Espoir (DRK)"; Bernhard Tuider: "Eo en la Nacia Biblioteko de Austrio kaj Eo-kurso en la Universitato de Innsbruck". Organizis kaj gvidis Alessandra Madella kun la helpo de Viko kaj Ahmad Reza Mamduhi. Jen la registraĵo de la sesio en la jutuba kanalo de UEA: https://www.youtube.com/watch?v=7P3rF5qW5KM

La 63-a Universitata kunpensado okazis la 8-an de septembro 2025. Zohre Ramezani, profesorino de la persaj lingvo kaj literaturo, prezentis detalajn lumbildojn pri la historio de la instruado de Esperanto en iranaj universitatoj. Ŝi respondis al la priaj demandoj de la publiko, kune kun Ahmad Mamduhi, kiu klarigis kiel li sukcesis kapti la intereson de pluraj universitatoj pri Eo-kursoj.

Fransoazo Noireau parolis pri sia grandega plurjara laboro pri la organizado de Esperanto-kursoj pere de WhatsApp por universitato Espoir de Kongo.

Philippe Planchon komencis varbi studentojn por la venontjara Erasmus-semajno pri Esperanto ĉe la Universitato de Tours en Francio.

Jen la registraĵo de la 63-a Kunpens(ig)ado pri Esperanto en universitatoj: https://www.youtube.com/watch?v=sF6PypA4oRM

**Konferenco EuroCALL 2025**

La 2025-a konferenco de EUROCALL (European Association for Computer Assisted Language Learning; esperante: Eŭropa Asocio por Komputil-helpa Lingvolernado) okazis de la 27-a ĝis la 30-a de Aŭgusto 2025 ĉe la Katolika Universitato de la Sankta Koro (Università Cattolica del Sacro Cuore) de Milano, Italio. Temas pri granda internacia kunveno pri la manieroj, en kiuj lingvo-instruado povas plej efike kaj soci-konscie uzi la novajn teknologiojn. Alessandra Madella prelegis en la oficiala programo pri 'The "30 Golden Hours" Project to Learn and Teach Esperanto' (la projekto '30 Oraj Horoj" por lerni kaj instrui Esperanton), kiel reprezentanto de Zaozhuang-a Universitato kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Partopreno de A.Madella en la Konferenco EuroCALL havis la subtenon de UEA kaj ESF.

**Eldonado**

Survojas preparado de la Antologio de ILEI fare de la estrarano Fernando Pita. La libro estis sendita al Flandra Esperanto-Ligo por traktado de kondiĉoj de eldonado.

**Kunlaboro kun enmovadaj institucioj**

**Kun INK/Bobelarto**

ILEI kaj INK – Interkultura Novelo-Konkurso iĝis partneroj. Ekde nun ambaŭ organizoj kunlaboros cele al plia evoluo de ambaŭaj agadoj. La kunlaboro okazos en kampo de reciproka informado, reklamado, publikigado, komunaj eventoj. Krome, konkursaj noveloj estos prezentataj dum la Tago de Esperanto-Libro.

**Kun UEA**

***La Estraro de ILEI varme gratulas la novan Estraron de UEA pro elekto kaj deziras sukcesojn kaj fruktodonan laboron! La Estraro de ILEI ankaŭ esperas al plia kaj sukcesa kunlaboro inter du organizoj por prospero de Esperanto.***

2025.09.20 okazis komuna kunsido pri ILEI-UEA ekzamenoj. Flanke de la ILEI-Estraro partoprenis Ahmad Mamduhi, Alessandra Madella kaj Karine Arakeljan. Estas planata evoluigi la ekzamen-procezon.

**Kun CED**

Alessandra Madella prelegis pri la eksperimentoj de E.L Thorndike dum la Esperantologia konferenco dum la UK, organizita por CED de Bengt-Arne Wickström.

**ILEI dum UK 2025**

La Estraro alvenigis 1000 revuojn de ILEI, kiuj estis disdonitaj senpage dum la Movada Foiro, pri kiu zorgis Alessandra Madella. Libroj de la Aktoj de ILEI 2022-23 estis donitaj al la ĉeestantaj sekciestroj kaj komitatanoj de ILEI por festi la 75-jariĝon de la Ligo. Dum la inaŭguro surpodie reprezentis ILEI Alessandra Madella, kiu ankaŭ prezentis la Ligon dum speciala programero. Organizis la Tagon de Lernado Marija Belošević, kun prelegoj interalie de Fernando Maja Jr, Ahmad Reza Mamduhi, Mireille Grosjean, Bernhard Tuider, Stela (Eszter Besenyei-Merger), Alessandra Madella.

Dum UK Alessandra Madella partoprenis en la programo de Virina Agado per la filmo "Floroj Ludoj" de MA-GA Filmoj pri Itala poetino. Pluraj aliaj ILEI-aninoj prezentis (i.a. Mirejo, Arko, Miora).

**Kunlaboro kun ekstermovadaj institucioj**

**Kun Ĉina Komunikila grupo**

Aperis la artikolo de Alessandra Madella: “Varma entuziasmo pri artefarita intelekto en Ĉinio alportis revolucion por edukado de Esperanto.” Ĉina Radio Internacia, 13-10-2025: **https://esperanto.cri.cn/2025/10/13/ARTI1760326065500894**

Reage al tio, Ahmad Mamduhi skribis, ke li surbaze de ŝia verko *“Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj”*, preparis per AI NotebookLM serion de aŭskulteblaj kaj spekteblaj podkastoj interalie en la itala, portugala, rusa, angla, ĉina, franca, germana, japana, korea, hispana kaj la persa — kaj al ili konstante aldoniĝas novaj lingvoj. Provizore oni povas trovi ilin en la Telegram-kanalo https://t.me/ILEI_pokastoj, dum oni planas probable starigi ankaŭ specialan ludliston “ILEI-podkastoj” en la jutuba kanalo de ILEI. La celo estas prezenti Esperanton kaj ĝiajn avantaĝojn al la ekstera publiko en plej multaj lingvoj.

**Kun eksteraj amaskomunikiloj**

Septembre en irana sendependa matena ĵurnalo "Ŝarg" (Oriento) aperis la artikolo de la Prezidanto Ahmad Mamduhi memore al la profesoro Renato Corsetti en la persa lingvo. La artikolo memorigas nin pri la bedaŭriga forpaso de nia estimata Renato, sed samtempe antaŭenigas lian vizion pri deangligo - liberigado de nacioj de la anglalingva hegemonio per uzo de Esperanto.

**Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu niajn elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI: Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI: Ahmad Reza Mamduhi

2025-10-15